Ludwig Uhland,

# La kapelo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Supre staras la kapelo
Sur la pinto de la mont',
La paŝtist' en suna helo
Ĝoje kantas ĉe la font'.

Triste la sonorileto
De funebro sonas de
La altaĵ' tra la kvieto,
La paŝtist' jam kantas ne.

Ĝin ne povas aŭdi soni
La gajuloj post viv-fin'.
Ho, paŝtisto, iam oni
Portos supren ankaŭ vin.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de* Ludwig Uhland *(∗1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-639-1287 (2012-11-02 08:49:45)*

*Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la vikipedian retejon* `http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland`.

Ludwig Uhland,

# La kapelo

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Supre tronas sur la monto
La kapelo en kviet'.
En la valherbej' ĉe l' fonto
Ĝoje kantas paŝtknabet'.

Kun funebra sonorilo
Ektimigas mortkantad'.
Finas tuj la ĝojjubilo
De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojintoj post la morto
Supren en la tombojn venos
Paŝtoknabo, laŭ la sorto,
jen ja Morto vin eĉ prenos.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de* Ludwig Uhland *(∗1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de* Hans-Georg Kaiser *(Cezar, ∗1954-05-21).*

*Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* `http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html`.

Ludwig Uhland,

# Die Kapelle

Droben stehet die Kapelle,
Schauet still ins Tal hinab.
Drunten singt bei Wies' und Quelle
Froh und hell der Hirtenknab'.

Traurig tönt des Glocklein nider,
Schauerlich der Leichenchor;
Stille sind die frohen Lieder,
Und der Knabe lauscht empor.

Droben bringt man sie zu Grabe,
Die sich freuten in dem Tal:
Hirtenknabe, Hirtenknabe!
Dir auch singt man dort einmal.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Ludwig Uhland *(∗1787.04.26 – †1862-13-11).*

*Arg-639-1286 (2012-11-02 16:53:38)*

*Vidu:*`http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl_l03.html`. *Pri la poeto vidu la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland`. *La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Conradin Kreutzer. La melodio estas aŭdebla tie:* `http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/drobenst.html`.